

Heinrich Heine,
 Libro de la kantoj, Songobildoj IX

tradukita de Manfred Retzlaff

Dormante milde songis mi,
 Ĉagren' forlasis min,
 Al mi aperis song-vizi',
 Plej bela la knabin'.

Marmore pala estis ŝi
 Kaj plena de sekret',
 En la okulo naĝis ĝi
 Samkiel perl-bluet'.

Kaj tiu bildo de marmor'
 Mallaŭte movis sin,
 Premetas sin al mia kor',
 Karesis ame min.

Batadas laŭte mia kor',
 Varmege brulas ĝi;
 Al ŝi sentiĝas ne amor',
 Ŝi estas el glaci'.

Ŝi diris: Kvankam estas mi
 Malvarma kiel mort',
 Konata tamen estas ĝi
 Al mi, de l' amo fort'.

Ne ruĝas mia buŝ' kaj vang',
 Sed min ne timu vi;
 Tra mia kor' ne fluas sang',
 Sed vin tre amas mi.

Kaj pli sovaĝe premis ŝi
 Min preskaŭ ĝis dolor';
 Forlasis min je l' kokvir-kri'
 La ino de marmor'.

*Traduko de la Germana poemo "Buch der Lieder, Traumbilder IX" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-697-1404 (2012-12-05 22:35:03)